

Cirkuladaj kaj Transportaj Aktivecoj

Cirkuladaj aktivecoj de vjetnamaj agrikulturistoj enfermiĝis ĉefe interne de malproksima sfero, de la domo al la kampo, kie oni kultivas akvan rizon. Por gardi la akvon, oni devas dividi la kampon en etaj rizejoj separataj unuj de la aliaj per randoj kies larĝeco sufiĉas por nur unupersona irado. En tiaj kondiĉoj, oni povas nur uzi homan forton por transporti ajnan varon, ĉu por produktado, ĉu por la ĉiutaga vivo.






Pro tio, ŝajnas ke neniuj lingvoj en la mondo posedas tiel diversan kaj riĉan vortprovizon por indiki transportadon en malproksima distanco.

Dum la franca havas nur *porter*, la rusa *нести*, la angla *to carry* kaj iagrade *to take*, la vjetnama, krom la vorto *mang* (porti) kun ĝenerala senco, ekzistas vico da vortoj indikantaj tre fakecajn transportmanierojn. En Esperanto, oni ne trovas tiom da korespondaj vortoj kaj en preskaŭ ĉiuj kazoj, oni povas nur traduki per perifrazoj. Jen estas la (malferma) listo de tiuj vortoj:


La diversaj vjetnamaj vortoj por indiki la agon “porti”

| N-ro | vjetnama vorto | prononcmaniero | esperanta klarigo |
|------|----------------|----------------|---|
| 1 | mang | /mang/ | porti, kunporti |
| 2 | câm | /kam/ | teni, manteni (en unu mano) |
| 3 | nãm | /nam/ | manteni (tute komforte ene de la manplato) |
| 4 | xách | /sek/ | manteni (pere de rimeno, sako ktp) |
| 5 | kéo | /keo/ | porti (helpe de longa rimeno tuŝanta la teron), treni, rimorki |
| 6 | bê | /be/ | (manporti) per ambaŭ manoj |
| 7 | bung | /bung/ | ambaŭmane preni/teni/porti (ambaŭ manoj altenleviĝantaj) |
| 8 | ôm | /om/ | porti, preni en siaj brakoj; brakumi, enbrakigi |
| 9 | bé | /be/ | (delikate) porti en siaj brakoj; brakumi, enbrakigi |
| 10 | ãm | /am/ | sinonimo de bé |

| | | | |
|----|-----------|-------------|---|
| 11 | bồng | /bong/ | sinonimo de bé |
| 12 | gùi | /guj/ | porti (ion) en dorsokorbo |
| 13 | cồng | /kong/ | dorsoporti (iun) |
| 14 | địu, điu | /diu/ | dorsoporti (bebon) pere de peco de ŝtofo kun rimeno |
| 15 | cặp, cặp | /kap/ | subbrake teni/porti |
| 16 | vác | /vak/ | porti (ion) sur siaj ŝultroj |
| 17 | cồng kênh | /kong ken/ | porti (iun) surŝultre |
| 18 | gánh | /genj/ | veктоporti (du egalpezajn ŝarĝojn) sur la ŝultroj |
| 19 | gông | /gong/ | surŝultre porti (ion) per alkroĉigo al unu ekstremaĵo de vekto |
| 20 | khiêng | /h̃jeng/ | (du aŭ multaj homoj) portante pezan ŝarĝon |
| 21 | đội | /doj/ | porti sur la kapo |
| 22 | khuân | /h̃uan/ | porti (pezajn aĵojn) |
| 23 | khuân vắc | /h̃uan vak/ | porti pezajn aĵojn per la forto de ambaŭ brakoj, dorso aŭ ŝultroj |
| 24 | đèo | /deo/ | porti (iun, ion) sur biciklo, motorciklo |
| 25 | thò | /tho/ | porti/transporti sur la dorso de ŝarĝobestoj aŭ per biciklo (ne rajdante sed puŝante la beston aŭ la biciklon) |
| 26 | vân | /van/ | aliloki ion pezan, ĝin rulante |
| 27 | đeo | /deo/ | - porti ion facile demetitan aĵon (orelringojn, okulvitrojn) - porti ion per fiksado sur vestaĵoj (ordenon, insignon, rubandon) |

| | | | |
|--|--|---|--|
| <p>2</p>  <p>cầm</p> | <p>3</p>  <p>nắm</p> | <p>4</p>  <p>xách</p> | <p>5</p>  <p>kéo</p> |
| <p>6</p>  <p>bê</p> | <p>7</p>  <p>bưng</p> | <p>8</p>  <p>ôm</p> | <p>9-10-11</p>  <p>bế - ẵm - bồng</p> |
| <p>12</p>  <p>gùi</p> | <p>13</p>  <p>cõng</p> | <p>14</p>  <p>địu - điu</p> | <p>15</p>  <p>cặp - cặp</p> |
| <p>16</p>  <p>vác</p> | <p>17</p>  <p>cõng kênh</p> | <p>18</p>  <p>gánh</p> | <p>19</p>  <p>gõng</p> |

Desegnoj de Hong Hac



Bibliografio

Tran Ngoc Them. Esplorante la Vjetnaman Kulturan Identecon. HoChiMinh urbo Eldonejo. 3a eldono, HoChiMinh urbo, 2001, pp 395-396.

Instituto de Filologio. Vortaro de vjetnama lingvo. Sociaj sciencoj Eldonejo, Hanojo 1988.

Nguyen Minh Kinh. Granda Vortaro Viet-Esperanto. Mondo- Eldonejo , Hanojo, 1999.

Kompilis/tradukis **Nguyen Xuan Thu**